Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 26/08/2021 Kvincentkvardekkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)**

## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

## Entute 815,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **282,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **227,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **201,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **105,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde decembro 2021)

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## EKSTRAĴOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 49 de "Por Komencantoj".

GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). En la kanto "La Espero" troviĝas en la unua strofo la longa frazo "Al la mond'eterne militanta ĝi
promesas sanktan harmonion". A). Kiu parto de tiu longa frazo estas la suborda frazo?
B). Diru kiu estas la predikato (= verbo) de la subjekto "ĝi"?
C). Kiun adjektivon difinas la adverbo "eterne", kiu "eterne" do ne estas adjekto ĉe iu ajn predikato (= verbo) kaj estas ĉi tie nur parto de la longa adjekto "al la mond' eterne militanta".
Ĉ). Kiun vorton difinas la adjektivo "sanktan"?

2). En eŭropaj lingvoj oni havas i.a. la ekstran frazparton "nerekta objekto" (indirect object).
En kiu frazparto estas tia "nerekta objekto" en Esperanto, kaj kial?

3). Se en eŭropa lingvo (kaj Esperanto) ni havas du frazpartojn en la sama frazparto, ligitaj per vorteto kia "kaj" aŭ "aŭ", kio estas la gramatika nomo por tiuj vortetoj?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 545. *Marcel Leereveld.*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



## La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5-minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



Esperanta Retradio

Artefarita inteligenteco kontraŭ klimata krizo **19a Augusto 2021**

# " Kiel oni fariĝas ekskomencanto."

La kurso kiu instruas kiel legi, aŭskulti kaj revizii ĉiun tagan Esperanton - Duolingo

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn. *Roger Springer*

**Artikoloj por AE.** Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, vi povas uzi la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendi ĝin rekte al AE *Roger Springer*

***Google Translate*** estas bonega tradukilo por vortoj anstataŭ uzi vortaron. Metu la ligon sur vian ekranon.

Kara Roger,

**Mi dankas vin** ĉar, pro mia antaŭa peto, vi nun enmetas la daton sur ĉiu paĝo de "Aŭstraliaj Esperantistoj." *Johano MASSAM*, Greenwood.

**Nur la Ĉefministro havas la rajton decidi fari militon aŭ ne**. Ne la parlamento

## PM Gough Whitlam hejmigis niajn militanojn el Vietnamujo

sen la permeso de Usono, do li perdis sian postenon neatendite.

The forgotten coup - how America and Britain crushed the government of their 'ally', Australia (johnpilger.com)

Estas grava ke Aŭstralianoj sciu ke Aŭstralio povus militi aŭ ne, laŭ la kuraĝo de Ĉefministro.

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

# Universala baza enspezo (UBI)



## Por pli kontentiga kaj sekura mondo

### Ĝi helpus monon flui tra nia ekomonia sistemo sen senutila laboro

# La Fuĝo de Kabulo kaj la Heredaĵo de Generalo Soleimani



**Irano forte kredas, ke la subita retiriĝo de okcidentaj fortoj estis kreita por krei malstabilecon kaj kaoson en Afganujo.**

The Flight from Kabul and the Legacy of General Soleimani – The Greanville Post

Antaŭe, la talibanoj faris 4 devontigojn al la Quds-Forto. Quds Force?

1 Ĝi konservu stabilecon ĉe la limo kun Irano,

2 ĝi ne kompromitu pri sia opozicio al la ĉeesto de iuj eksterlandaj fortoj,

3 ĝi ne celu aliajn etnojn aŭ sektojn,

4 kaj ke "fratoj ne mortigu fratojn." *Roger Springer*




## La fino de 20jara milito






https://twitter.com/i/status/1429373972924276736 Finfine paco por Afganujo

## Novaĵoj kaj Agado de WBW: Ne Eniru Militon Kun Ĉinio - World Beyond War . . .




Ĉu la militaj industrioj de Usono bezonos novan militon por helpi la ekonomion?

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917



# KIO kaj KIU

Jen la respondoj konsilataj. Notu ke en kelkaj kazoj oni povus uzi aŭ unu aŭ alian, kvankam la de mi donita estas iomete pli uzinda.

Notu ankaŭ, ke ĉi tiu ekzercaĵo havas nenian rilaton al iu ajn ekzameno. *Marcel.*

1). Kio estas tio? - Tio estas donaco al ci.
2). Kio estas li? - Li estas la celtenulo (ĉe pilkludo).
3). Kio estas tiu? - Tiu estas la malantaŭulo.
4). Kio estas ŝi? - Ŝi estas maŝinlaboristo.
5). Kio estas tiu ĉi?- Ŝi estas la subĉefo.
6). Kiu estas li? - Li estas Johano Johnson.
7). Kiu estas tiu? - Tiu estas mia frato.
8). Kiuj estas ili? - Ili estas miaj fratinoj.
9). Kiuj estas tiuj?- Tiuj estas miaj nepinoj.
10). Kio estas li? - Li estas plumbisto.
11). Kiu estas tio? - Tio estas nova membro.
12). Kiu estas tiu? - Tiu estas mia frato.
13). Kio estas lia nomo?- Li nomiĝas Henriko.
14). Kiu el tiuj nomoj estas lia?- Tiu estas lia nomo.
15). Ĉu li nomiĝas Henriko?- Jes, tio estas lia nomo.
16). Kiun nomon el la tri ci preferas?- Mi preferas tiun (el/la tri)
17). Kio estas ŝi? - Tio estas la reĝino de Britio.
18). Kiu estas ŝi? - Tiu estas reĝino Viktorino.
19). Kiu staru en la mezo?- Tiu staru en la mezo.
20). Kio estas tiu en la mezo?- Tiu estas la kapitanino.
21). Kio estas tiu libro? - Ĝi estas vortaro.
22). Kiun el la libroj ci aĉetos?- Mi aĉetos tiun (libron).
23). Sur kio ci sidas? - Mi sidas sur kuseno.
24). Kun kiu ci manĝis? - Mi manĝis kun miaj gepatroj.
25). Por kio li studas? - Li studas por teĥnikisto.
26). Kiel kio ci laboras? - Mi laboras kiel bankisto.
27). Kiel kio ci ludos? - Mi ludos kiel celtenulo.
28). Kiel kiu ĝi aspektas? - Ĝi aspektas kiel ĝia patro.
29). Kiel kiu ŝi aktoras? - Ŝi aktoras kiel Reĝino Viktorino.
30). Jen novveninto; kio estas ŝi? - Ŝi estas la kuiristino.
31). Jen kvar virinoj; kiu estas cia patrino?-Tiu ŝi estas.
32). Kiu estas tio? - Tio estas mia fratino.
33). Kion li faras? - Li faras kadrojn.
34). Kio li estas? - Li estas kadrofaristo.
35). Kio estas lia nomo?- Lia nomo estas Johano.

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

36). Kiu li estas? - Li estas Johano Peters.
37). Kio ŝi volas fariĝi?- Ŝi volas fariĝo flegistino.
38). Kio ŝi estas? - Ŝi estas fraŭlino.
39). Kiu ŝi estas? - Ŝi estas fraŭlino Johnson.
40). Kiu ŝi volas fariĝi?- Ŝi volas fariĝi Sinjorino Peters.

## KLARIGO PRI MIA RUBRIKO "POR KOMENCANTOJ".

Kelkaj legantoj eble jam rimarkis, ke la demandoj en tiu rubriko ne estas hazardaj, sed ke, el de numero unu ĝis la estonta fino, mi gradigis la demandojn tiel ke ĉe ĉiu nova gramatika temo mi unue donas facilajn demandojn per kiuj oni komprenas la bazan uzon, kaj ke post tio la demandoj estas pli malfacilaj. Tiu ekzerco do celas, ke la studantoj facile sed necese lernu la gramatikajn regulojn de Esperanto, kiuj kun multaj esceptoj aperis en iliaj lernejaj jaroj, kaj kiujn ili ofte forgesis, sed bezonas scii kiam ili lernas Esperanton. *Marcel.*

## DEMONSTRACII.

Normale mi demonstracias kontraŭ registaroj, ĉar registaroj ofte agas kontraŭ la bonfarto de la civitanoj. Ekzemple militi en Vjetnamujo, aŭ nenecese pliriĉigi la parlamentanojn, aŭ la troa krueleco de la polico.



Sed hodiaŭ mi ŝatus demonstracii kontraŭ la hodiaŭaj kruelaj demonstrantoj, kiuj trovas mian vivon malpli valora ol siajn dolarojn.

Ĉifoje la registaro defendendas, ĉar ĝi zorgas ke la homoj ne mortu pro la virusoj. Ĝi zorgas ke la virusoj ne povu mortigi min. La nunaj demonstrantoj nur pensas pri si mem kaj ke ili ne mortigatos de la virusoj ĉar ili estas pli riĉaj kaj pli sanaj kaj pli fortaj. Ĉar la viktoria registaro kun sia polico laboras por nia bonesto, ĝi agas ĝuste kaj admirinde. Ĉar pluraj homoj malhelpas la registaron, ni nun havas plurajn virusanojn en Viktorio. Malhelpi tiujn egoistojn estas malfacila por la registaro, kaj same puni ilin. *Marcel Leereveld.*

Oni povas aldoni sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

**SOLVO DE LA KVIZETO 49** *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



1). A). Neniu parto, ĉar la tuta frazo estas nekompleksa propozicio.
B). "promesas" estas la predikato de la subjekto "ĝi".
C). La adverbo "eterne" difinas la adjektivon "militanta".
Ĉ), La adjektivo "sanktan" difinas la substantivon "harmonion".
2). En Esperanto la eŭropa "nerekta objekto" estas "adjekto", ĉar ĝi komenciĝas per la ordinara prepozicio "al" ("ordinara", ĉar "al" indikas ankaŭ lokon kaj tempon).
3). La vortetoj "kaj" kaj "aŭ", kiuj kunligas frazpartojn (kaj eĉ vortojn aŭ tutajn propoziciojn) nomiĝas "konjunkcioj"n. . *Marcel Leereveld.*

Ĉirkaŭ 1.300 homoj tage (425.000 jare) mortas pro perforto tra la mondo.
La moskito, aliflanke, kaŭzas ĉirkaŭ 725.000 mortintojn jare.



## Ĉinujo konkeras sian plej novan Deltan infekton en 35 tagoj

China tames latest Delta-induced surge in 35 days - Global Times



Miaj fiŝoj. Foto el la 2a etaĝo.

Roger Springer

**3ZZZ** En la elsendo de la 23a de augusto audiĝas parto de la prelego de Nicolau Dols pri traduko, la opinio de George Orwell pri " sporta spirito" kaj ne ordinara versio de la himno " La espero". Amike, *Franciska Toubale*



***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***